

LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 159, 2019: 5

Esperanto-Kongreso de la Ŝtato San-Paulo



LA LAMPIRO

60-a jaro, numero 159, 2019: 5

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Graficarango: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj
Ĉefkovrilaj fotografaĵoj de Ciro*

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca

05041-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183

easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2019

Simple membro.....R\$ 150,00.

Subtena membro.....R\$ 300,00.

Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Deĵoroj:

merkredo: 15h - 17h; jaŭde kaj

vendrede: 13h - 17h; sabate: 9h - 12h

(escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la

deĵoro daŭras de la 9h ĝis la 18h)

Estraro

Prezidanto: Genildo Martins Coelho

Vicprezidanto: Marcos Zlotovich

1-a Sekretarino: Anna Lobo de Carvalho

2-a Sekretarino: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: José Roberto Tenório

2-a Kasistino: Neide Aparecida de Freitas

Propaganda Direktorino: Cristina C. de Graaf

Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino Castelo Branco kaj

Aparecida de Souza Araújo

Anstataŭantoj

José Mauro Progiante kaj José Martins Coelho

ENHAVO

5

La 13-a Esperanto
Kongreso de La
Ŝtato San-Paŭlo

22

Ne Nur Konsulti, Sed
Regule Legi Vortaron

27

Forpasis La Nepo

19

El La Vivo de
Fajrobrigadisto

23

Lingvaj Respondoj

28

Kiomgranda Estas
Via Bonkoreco?
(Alivorte, Kiomlibera
Vi Estas?)

20

La Perfekta Ujo

25

Ekzemplo Imitinda
kaj Imitenda!

29

Iom da poezio:
Trobo kaj
Esperanto estas
fratoj!

21

Abelo kaj Homoj: Ĉu
Longdaŭra
Kunvivado?

26

Denove Ĉesos La
Ondo de Esperanto

30

Bakuraŭo



Vortoj de la prezidanto

BELA FESTO EN SAN-KARLO!

Kun enskribiĝo de pli ol cent samideanoj, plene sukcese okazis la 13-a Esperanto-Kongreso de la Ŝtato San-Paŭlo. La sidejo estis bonegaj ĉambroj en la publika lernejo “Doutor Álvaro Guião”, kiu mem estas admirinda konstruaĵo pli ol jarcent-aĝa, kun sia nobla arkitekturo, artaj vitraĵoj, kaheloj kaj feraĵoj. La ĉefa salono certe estas unu el la plej belaj kaj komfortaj, kiujn ni povis ĝui en la sinsekvo de niaj kongresoj. Unu el la instruistoj de tiu impona lernejo vizitis la kongreson sed bedaŭrinde ne povis partopreni en nia malferma ceremonio.

La sabata arta vespero okazis en alia, same taŭga loko, nome en la ĉambrego de la Sekretariejo de Kulturo, ĉirkaŭ unu kilometron for de la kongresejo.

Oni emfazu, ke la lokaj Esperanto-aktivuloj sukcesis havigi al la kongresanojn tiajn bonegajn lokojn tute senpage, kio nepre faciligis la financon vivon de nia asocio. Koran dankon kaj gratulon al la koncernaj aŭtoritatuloj, kiuj perfekte komprenas la celon kaj idealon de nia movado!

LA MALFERMO

Post unuhora gaja akceptado de kongresanoj en la halo de la kongresejo, je la 10-a horo de la 12-a de oktobro, la tuta kongresanaro kolektiĝis en la ĉefa salono, kie oni sonigis la Brazilan Nacian Himnon. Gvidis la malferman ceremonion S-ino Cristina Graaf, kiu zorgas pri la departemento de turismo de EASP. Unue, ŝi donis la parolon al a prezidanto de EASP, S-ro Genildo Coelho, kiu malfermis la eventon per simpla saluto kaj bondeziroj. Li kaptis la okazon por atentigi ĉiujn pri la fakto, ke en la proksima monato februaro okazos elekto de nova estraro en EASP, do necesas proponoj de kandidatigoj kaj pripensado pri la estonteco de nia asocio. Li dankis la lernejestrojn, kiuj liveris al ni tian imponan kongresejon kaj la lokajn aktivulojn, kiuj multe laboris por la sukceso de tiu evento.

Sekve parolis S-ro Gilberto Menegasso, kiel reprezentanto de la loka organiza grupo. Li bonvenigis ĉiujn kaj esprimis sian ĝojon, ke la urbo San-Karlo duafoje akceptas la taskon organizi la ĉefan EASP-eventon. La ĉeestantoj varme aplaŭdegis lin.

Fine, S-ro Paulo S. Viana nelonge paroladis. Li gratulis la homojn, kiuj venis el pli ol 15 urboj por doni sian prestiĝon al nia kongreso. Li nomis tiujn homojn “elito”, ĉar ili komprenas la veran sencon de nia movado: amika kontakto de homoj kun la sama idealo de paco, interkompreniĝo, kleriĝo kaj amikeco - kiuj ne limiĝas al la interretaj agado. “Interreto estas grava por nia afero - li diris - sed ĝi ne povas anstataŭi niajn manpremojn, brakumojn, kisojn kaj ĉeestan energion.” Li proponis ankaŭ, ke ĉiu kongresano sendu mesaĝon al la direktoroj de la lernejo, kie okazas la kongreso, por gratuli ilin



pro ilia apogo al nia movado. Same al la Sekretario de Kulturo de San-Karlo. Post kantado de nia himno La Espero, oni finis la malferman ceremonion.

PRELEGOJ

En la daŭro de la tuta sabato kaj parto de la dimanĉa mateno, la kongresanoj povis ĉeesti sep prelegojn:

“Esperanto Serioze”

Pri tio prelegis la veterana Esperantisto Saulo Wanderley, el Rio-de-Ĵanejro. Li emfazis la gravecon de Esperanto en nia mondo, kie la homoj bezonas pli ol iam ajn interkomprenon kaj homecan idealon. Por tio, estas tasko de Esperantistoj, kiuj havas en siaj manoj tute oportunan perilon, sin teni kiel torĉoportantoj. Li diris: “Esperanto devas esti lernata, uzata, disvastigata serioze. Ĝi estas lingvo, kiu serioze influas la homan vivon, laŭ pluraj faktoroj. Ĝi estas maniero alpreni utilecon per komunikado, lernado, instruado, socia agado, mempersona kresko. Gravas do serioze lerni, serioze uzi, serioze diskonigi nian lingvon. Esperanto ne estu simpla hobbio, sed signifoplena elemento en la vivo de Esperantistoj.”



“Daŭripova disvolviĝo: ĉu vere?”

Prelegis Alex Cesário, el la urbo Araraquara/SP. Diskuti la evoluon de la homa vivo en nia mondo signifas diskuti la prizorgadon de la naturaj rimedoj. Ĝis nun, la homaro konsumas la mondajn vivrimedojn kvazaŭ ili estus senlimaj. Tamen, je pluraj punktoj ili elĉerpiĝas. Necesas koncepti alian

specon de vivstilo, trans la kapitalisma serĉado de senlima kresko. Oni atentu la teorion pri malkresko de Serge Latouche, laŭ kiu ne eblos por ĉiam konsumadi. Tion ilustras la situacio, en kiu oni senbride konsumas bestdevenajn produktojn kaj nutraĵojn.



“Ludprelego”

Audino Castelo Branco, konata instruisto pri Matematiko el la urbo



Atibaia/SP, pritraktis la matematikan koncepton pri probablo kaj pri tio, kiel tiu nombro estas komprenata de ni. Li organizis amuzan ludon, en kiu la publiko aktive partoprenis, simile kiel en televidprogramo. Homoj estis premiitaj per ĉokolado, kiam ili sukcese trapasis probablotestojn.

“El kie venas la astrologiaj influoj?”

Inĝeniero Adonis Saliba el la urbo San-Paŭlo, konata veterana Esperantisto, detale informis pri diskutoj pri la antikva arto de Astrologio. Ĝis hodiaŭ oni ne propradire formulis la manieron, kiel astrologiaj influoj okazas, kaj kiel ili manifestiĝas. Dum la prelego li montris nuntempajn evidentajojn pri tiaj influoj je borsaj evoluoj de akciaj prezoj. Fizikaj hipotezoj, en la kampo de kvantuma energio, povas ligiĝi al cerba aktiveco de homoj, ĉefe pro ĵus trovita “bio-fotona” produktado en cerbaj ĉeloj. Estis prezentita kaj pridiskutita ankaŭ la astra ĉarto de Zamenhof.



“Mamografio”

Emerita profesoro kaj fakulo pri Nuklea Medicino, Radioterapio kaj Radiodiagnozo, Genildo Martins Coelho el la urbo San-Paŭlo prezentis detalajn informojn pri mamografio. Li montris multajn diapozitivojn, kiuj ilustris la preventajn rimedojn por eviti mamkanceron. Krome, li klarigis la



signifon kaj gravecon de frua diagnozo. Li instruis la ĝustan manieron por memekzamenado kaj la funkciadon de la aparato uzata por mamografio. Li finis per grava admono: “Estas nepre necese, ke virinoj bone konu sin mem”.

“Kiel vi kredas, vi kreas”

Per vigla prezentado, kiu kortuŝis kaj amuzis la ĉeestantaron, la juna Pedro Freitas (el Ribeirão Preto/SP) prelegis pri la graveco zorgi pri siaj propraj pensoj. Li komencis sian prezenton per ridiga maniero veki la ĉeestantaron:



skui la najbaron kaj krii: “Vekiĝu!”. Ĉiu ago estas rezulto de penso. Se oni sukcesas direkti sian penson al pozitivaj aferoj, tiam rezultos pozitivaj agoj. Kaj tio dependas plej ofte de konstanta ekzercigado. Tion oni komencas per taŭga korpa sinteno, kultivado de sanaj homaj rilatoj kaj praktikado de solidareco.

“Dietfuroroj”

Emerita profesoro Francisco Stefano Wechsler, el la urbo Campinas/SP, klare prelegis pri la trompoj de modaj dietoj, kiuj sin prezentas kiel



“miraklaj”. Li analizis la lastatempajn retajn misinformojn, ke “lakto estas venenaĵo” kaj trafe informis pri la netoleremo de homoj kontraŭ laktozo kaj laktaj proteinoj. Li klarigis pri la netoleremo al gluteno, kiu atingas etan procenton el la homoj. Li kritikis la dieton Atkins kaj aliajn danĝerajn dietojn. Fine li konsilis, ke oni kriterie analizu la modajn dietojn por eviti damaĝon al sia sano.



PRELEGETOJ

En du sesioj, kongresanoj povis ĉeesti ses 15-minutajn prelegetojn:

“Omaĝo al Sylla Chaves”

Alfredo Aragón (Rio de Janeiro/RJ) prezentis filmetojn kaj memorigis la agadon de la eminenta Esperantoaktivulo Sylla Chaves, kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj.

“Veraj damaĝoj el falsaj novaĵoj”

James Rezende Piton (Paulínia/SP) atentigis pri la danĝero de senrespondecaj misinformoj, kaj pri nia civitana devo agi kontraŭ ili.

“Leonardo da Vinci: 550 jaroj de la arketipo de la Renesanco”

José Mauro Progiante (Bauru/SP) memorigis pri la jubileo de unu el la plej elstaraj geniuloj en la historio, kaj prezentis trarigardon pri lia ampleksa kreado.

“Prizona sistemo de ŝtato San-Paŭlo”

Paula Cristina Medve (Ribeirão Preto/SP) prezentis interesan trarigardon pri la sistemo de prizonoj en nia ŝtato, kiu estas unu el la plej bone organizitaj en Brazilo.

“Nevideblaj surstratuloj”

D-ro Elmir dos Santos Lima (Rio de Janeiro/RJ) kortuŝe atentigis pri la



kruela situacio de multaj miloj da homoj, kiuj mizere vivas surstrate, tute ignorataj de la ĝenerala socio. Necesas pensi pri ili homece, kaj klopodi helpi. Inter ili, troviĝas eĉ ekŝesperantistoj!

”Ĉu vi kutimas legi vortaron?”

Paulo Sergio Viana (Lorena/SP) prezentis vortarojn kiel neelĉerpeblajn trezorojn. Necesas legi ilin, ne nur konsulti. Vortoj estas esence gravaj elementoj en nia mensa vivo. Ju pli profunde ni interesiĝas pri ili, des pli saĝa estas nia kapablo pensi.



ARTA VESPERO

Sabate, la 12-an de oktobro, je la 20-a horo, komenciĝis arta vespero en la bela, ampleksa salono de Municipa Centro de Arto kaj Kulturo de la urbo San-Karlo. Japana virina grupo en tradiciaj vestoj prezentis belajn dancojn kaj eĉ dancigis la ĉeestantaron je “cirkla danco”, kiu ege amuzis ĉiujn. Sekvis deklamoj de Walter Pontes kaj Graça Thuler, ambaŭ venintaj el la urbo Niterói/RJ. Deklamis ankaŭ la veterana, populara Esperantisto el la urbo Barra do Garças/MT, Amarílio Carvalho, helpate de James Piton (Paulínia/SP). Poste grupo de Esperantistoj el San-Karlo sentoplene kantis kelkajn tradiciajn popolkantojn en Esperanto. Ankaŭ a denaska Esperantistino Milena Piton, akompanate de sia patrino Isis Piton, regalis la

publikon per belaj kanzonoj. Finis la programon la “rep-kantisto” Tone, kiu vigle kantis kaj kantigis la publikon.

PAROLIGA RONDO

Sabate, la 12-an de oktobro, posttagmeze, grupeto da komencantoj, kiuj enskribiĝis en la kongreso akompanis la veteranan estraron de EASP, José Roberto Tenório (San-Paŭo/SP) en kelkhora paroliga rondo en aparta ĉambro de la kongresejo.

AŬTORA DUONHORO

La lasta programero de la kongreso, antaŭ la oficiala fermo, estis aŭtora duonhoro, dum kiu la publiko povis fari demandojn al du aŭtoroj: José Mauro Progiante, pro la lanĉo de la infanlibro “La ŝtelo de Blua Songô”, publikigita de Eldonejo Esprima; kaj Paulo S. Viana, pro la lanĉo de Esperanta traduko de “Esav kaj Jakob”, de Machado de Assis kaj de minilibro “Duono de guto”, originale verkita. Krome, oni diskutis ankaŭ pri relanĉo de la antaŭe elĉerpitaj tradukoj de “Dom Casmurro” kaj “Postmortaj Rememoroj de Brás Cubas”, ambaŭ de Machado de Assis. La aŭtoroj subskribis ekzemplerojn de libroj al aĉetintoj.



LIBROSERVO

Dum la dutaga kongreso glate funkciis varia libroservo de EASP, sub la



serioza kaj sindediĉa prizorgado de la respondeculo pri la Butiko de EASP, S-ro Carlos Rodrigues. Lin helpis S-ino Aparecida Araújo. Ankaŭ Eldonejo Esprima proponis sian stokon de libroj kaj minilibroj en Esperanto, inkluzive kun relanĉo de elĉerpitaj klasikaĵoj.


FERMO

Dimanĉe, la 13-an de oktobro, je la 13-a horo, la prezidanto de la Kongreso salutis kaj dankis la organizan komisionon, la ĉeestantaron kaj niajn gastigantojn. Salutis kaj ricevis varman aplaŭdegon la loka organizanto Gilberto Menegasso. Anonciĝis la urbo, kie okazos la 14-a Kongreso de Ŝtato San-Paŭlo, en oktobro 2020: la urbo Indaiatuba. Oni povis spekti filmeton pri tiu urbo, kiu espereble ricevos same entuziasman publikon kiel ĉi-jare. Oni oficiale fermis la belan festkongreson en San-Karlo per verva kantado de “La Espero”.

PAULO SÉRGIO VIANA











SERPENTO

ALENCAR ESMERALDO

Labortago por fajrobrigadisto estas 24-hora, de la 8-a ĝis 8-a horo de la proksima tago”. En unu el tiaj tagoj, ni ĉeestis en la kazerno, kaj estis tute en ordo, pasis la tago sen grava okazaĵo.

Mi memoras, ke mi sidis en veturilo, kiu nomiĝas sav-veturilo, nome aŭtomobilo, kiu pretas helpi okaze de akcidento, kun viktimo inter feraĵoj, ĉevalo falinta en puton, k.s..

Nokte, cirkaŭ la unua horo, iu nin alvokis pro okazaĵo, ke ĉevalo falis en puton, en bieno. Malgranda bieneto, kiun la posedanto ankoraŭ estis konstruanta. Li fosis puton por alporti akvon al la hejmo. Sed li forgesis fermi la puton, kaj jen la malfeliĉo por la ĉevalo. Kiam ni alvenis, ni preparis ilon por tiaj okazoj, ilon kiu taŭgas por suprentiri ĉevalon kaj pezajn objektojn. Ĝi konsistas el kablo kaj rul-bloko, kiu multobligas la forton.

Ne estis loko por fiksi la kablون. Mia estro Admir fine trovis taŭgan lokon por fiksi la kablون, kaj tien li alproksimigis sian manon. Estis mallume. Ni senzorge interparolis, kaj mi diris:

— Bonega loko por ankri kablون! Mia estro metis sian manon tien, kaj mi avertis:

— Haltu! Ni ne scias, kio troviĝas ĉi tie, estas mallume. Ni bezonas



Governo do Estado de São Paulo

ekzameni la lokon, nur poste meti la manon por fiksi la kablون.

Mi havis lanternon. Fariĝis lumfasko kaj mi vidis serpenton tuj atakontan mian amikon.

— Sergento, vidu kio atendis vin!

— Dio mia! Serpento! Se mi metus mian manon tien, vi ĉiuj devus konduki min al hospitalo. Terure!

La serpento restis en sinteno de atako, aŭ defendo, tio dependas de la vidpunkto. Ĝia ataksinteno havas la formon de “S”, per kio ĝi akiras forton por ĵeti sian kapon ĝis sia celo. Tiuspeca serpento populare nomiĝas “Kruc-Urutuo”, ĉar ĝi surhavas figuron de kruco, kaj estas tre venena.

La serpento fine foriris kaj ni daŭrigis la aranĝadon de la ilo por eltiri la kompatindan ĉevalon. Ni elprenis ĝin el la truo per ligaĵo al ĝiaj piedoj, laŭ la ĝusta tekniko. La laboro daŭris ĉirkaŭ du horojn.

Poste, ni dum longa tempo meditis pri la danĝero, kiun ni trapasis. ■

Psikologio

LA PERFEKTA UJO

ISIS C. OKABE PITON

Antaŭ kelkaj tagoj, mi aŭdis pri tiu ĉi rakonto: La perfekta ujo. Mi rakontos pri ĝi al vi, karaj legantoj, laŭ mia memorkapablo. Ĝi temas pri monaĥoj, kiuj bezonis elekti novan estron inter si. Okazis, ke la bonkora, justa, inteligenta kaj saĝa estro estis tre maljuna kaj lia morto baldaŭ okazos.

La estro havis zorgaton, al kiu li ĉiutage instruis siajn konojn, kaj ĉiuj estis certaj, ke la zorgato estos la nova estro. Sed la forpaso de la estro venis antaŭ ol ĉiuj povis imagi, kaj la monaĥoj ekhavis grandan problemon, ĉar la disĉiplo pensis kiel mirinda kaj kapabla homo estis la estro, kaj li respondis al ĉiuj ke li ne estas preta por gvidi la monaĥojn.

La monaĥoj pensis peti de la plej maljuna monaĥo akcepti la postenon, tamen la maljunulo ne akceptis kaj proponis teston kaj tiu, kiu solvos la defion estos la nova gvidanto. La maljunulo petis, ke monaĥo metu tre belan, mirindan kaj perfektan ujon en la centron de la monaĥejo kaj klarigis al ĉiuj: Vi devas solvi la problemon de tiu ĉi kesto. Ĉiuj atente rigardis kaj miris pri la belaj kaj simetriaj desegnaĵoj sur la ujo. La monaĥoj pasigis la tutan tagon admirante ĝin, tamen neniu sukcesis malkovri la problemon de tiu kesto.

Pasis unu tuta tago kaj neniu revenis al siaj farendajoj, ili simple rigardis la ujon. Subite ekstaris juna monaĥo kaj per peco da ligno li rompis la ujon. Ĉiuj estis mirigitaj de lia

sinteno, kial li kuraĝis dispecigi la belan kaj perfektan ujon?

La maljuna monaĥo deklaris, ke la junulo, kiu rompis la ujon estos la estro, ĉar li sukcesis solvi la problemon.

Foje en nia vivo ni trovas tiajn mitojn pri “perfektaj ujoj”, kiuj haltigas nian kapablon esti pli bonaj, sekvi antaŭen, ĉar nia kredo al iu, kiu estas “perfekta” en iu aspekto, foje portas al ni senton pri manko de kapablo atingi ion.

Ni bezonas koni nin mem, por klare scii, ĉu ni estas sufiĉe bonaj, kiuj estas niaj kvalitoj kaj vidi ankaŭ tiujn, kiuj estas niaj malfortaj punktoj, kiujn ni bezonas plibonigi. Sen komparo al aliaj homoj, ĉar foje la komparo estas perforto kontraŭ ni mem.

Se oni haltas dum tro da tempo por admiri la perfektecon de aliaj homoj kaj ne zorgas pri sia memevoluo, oni neniam estos kapabla fari ion, kion ni admiras, kaj la sento pri senutileco atingas nin, konsekvence mankos al ni memestimo. La manko de memestimo kondukas al memsabotado, ĉar nekonscie nia menso laboras por pravigi nian kredon pri senutileco.

Ĉiam estas tempo por kuraĝi rompi la miton de la perfekta ujo. Koni sin mem kaj la realajn cirkonstancojn por analizi kaj plani kiel kaj kiom da tempo oni bezonos por atingi iun celon estas tre grave por la sukceso.



Arte Sintonia

Abeloj Kaj Homoj: Ĉu Longdaŭra Kunvivado?

VALDEMIR MOREIRA



Judy Romero

Plej ofte oni memoras pri sociorganizado, mielo aŭ pikado, kiam oni parolas pri apis mellifera, la populare konata Eŭropa Abelo...

Sed mi konsideras utile scii iom pli pri tiu fama insekto, ĉefe pro tio ke ĝi influas grandskale en la vivon de homo, kaj tiel vekas la atenton de ĉi tiuj al la devo helpi ilian konservadon...

MIELO: konsistas el pluraj eroj utilaj al homa sano aŭ nutrado... La sukero, kiu dolĉigas ĝin estas speciala kaj facile digestebla, ne postulante lacigan laboron de la organismo...

POLENO: ankaŭ altvalora nutroelemento kolektata de la abeloj, oni povas manĝi ĝin por restarigi la funkcion de la imunosisteno, plej multe indikata al profundaĝuloj... **REGA ĴELEO:** konsiderata kiel vera "miraklo" de la naturo, la junaj abeloj produktas ĝin post digestado de la **POLENO** kun la celo nutri la ovojn ĵus deponitajn kaj uzi ĝin kiel ekskluziva nutraĵo de la reĝino. Por rapida kompreno de la valoro de la **REGA ĴELEO**,

vivlongeco de ordinara abelo varias inter kvardek tagoj dum intensiva laboro kaj ses monatoj dum "feria" periodo; kaj la **REGINO** havas vivlongon de ĉirkaŭ 6 jaroj... **PROPOLISO:** natura antibiotiko, produktata de la abeloj per rezinoj de plantoj... **APITOKSINO:** veneno de la abeloj, uzata en fakaj laboratorioj por produktado de medikamentoj... **VAKSO:** uzata en arto, kuracado,

senharigo de parto de la korpo...

Krom tia riĉo priskribita supre, ankaŭ la industrio de beleco profitas la produktojn de la abeloj en pluraj aplikoj. Tamen, la laboro de abeloj, kiun oni konsideras la plej grava, estas la polenigado de floroj, garantianta kvanton kaj kvaliton de fruktoj.

Kio do okazas al abeloj lastatempe? Oni scias, ke ili suferas atakon de homoj diversmaniere: amasa uzado de agrotoksaĵoj, detruado pro timo de la pikado, senbarbarigado malpliiganta la kvanton da floroj kaj aliaj utilaj elementoj... Kelkaj sciencistoj pensas, ke radiado de elektraj ondoj ankaŭ aldoniĝas, en la nuntempa vastega elektronika komunikado...

Oni serĉas solvon kontraŭ malapero de abeloj... ĉu vi havas proponon? Aparte mi fidus je la apero de multaj novaj abelbredistoj, kiuj certe fariĝos protektbatalantoj de tia nekontestebla riĉo!

Fine, mi rekomendas pliajn informojn pri la afero en JuTubo, kio certe favoros pli klaran komprenon kaj fortigon de konscio. Tre utila libreto nome *Abelhas, as farmacêuticas com asas*, (Abeloj, flugilhavaj farmaciistoj) eldonejo **MIR**, aŭtoro Lorich, alportas informojn bazitajn sur scienca esplorado, kaj helpas la leganton bone utiligi la diversajn nutrovarojn ĉi tie cititajn... ■

Ne Nur Konsulti, Sed Regule Legi Vortaron

PAULO SÉRGIO VIANA

En la komenco estis la Vorto...

(Johano)

Vortoj estas gravaj elementoj en la homa vivo, kaj homoj ofte neglektas ilin, kio kaŭzas foje grandajn miskomprenojn. Sen ili ne estus ebla ekzisto de la homa menso, tia, kia ĝi estas. Iuj psikologoj eĉ asertas, ke oni nur vere rekonas en la mondo tion, kion oni povas nomi, atribui al ĝi vorton.

Kiu zorge interesiĝas pri klara kaj preciza uzado de vortoj, tiu havas pli klaran, pli saĝan penskapablon. Tial, jam antaŭ miloj da jaroj, homoj komencis kolekti vortojn. La unuaj vortaroj kreiĝis ŝajne en Mezopotamio, ĉirkaŭ 2600 jarojn antaŭ Kristo. Ili estis faritaj per tabuletoj, en kojnoforma skribo. En la unua jarcento p.K., grekoj komencis produkti leksikajn listojn. Ankaŭ romianoj uzis ilin. En tiu tempo oni ne listigis vortojn laŭ alfabeto ordo: ĉi tio okazis nur ekde la fino de Mezepoko. Tiam kreiĝis la unuaj dulingvaj vortaroj (unu el la lingvoj estis ĉiam la latina).

En la XV-a jarcento, post la invento de presarto, vortaroj plimultiĝis kaj diskoniĝis.

Vortaroj estas utilaj por:

- montri la signifon kaj ortografion de vortoj;
- informi la devenon de vortoj (etimologio);

- informi la gramatikan funkcion de vortoj;
- gardi unuformecon kaj unuecon de lingvo;
- helpi la lernadon de denaska aŭ fremda lingvo.

Tio signifas, ke regula legado de vortaroj estas potenca (kaj ne ofte rekomendata!) didaktika rimedo. Per tio oni povas pli facile verki tekston, eklerni sinonimojn (do eviti ripetadon), eklerni nuancojn de similsignifaj vortoj, kaj eĉ ekhavi novajn ideojn.

Se vi ankoraŭ dubas, jen mi prezentas al vi kelkajn defiojn, kies solvoj facile troviĝas en bona vortaro:

- Kiu estas la diferenco inter “tre” kaj “multe”?
- Kiu estas la diferenco inter “numero”, “nombro” kaj “cifero”?
- Kiu estas la diferenco inter “kolori” kaj “kolorigi”?
- Kiu estas la diferenco inter “malnova”, “antikva” kaj “arkaika”?
- Kiom da signifoj havas la vorto “de”?
- Kion signifas la vorto “deĵi”?

- Ĉu vi scias la signifon de la vorto “luti”?

Fine, oni povas diri, ke regula leganto de vortaro fariĝas pli modesta persono, ĉar baldaŭ li ekpensas: “Kiom da aferoj mi ne scias!” ■

Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Demando

Kiu estas la diferenco inter la membroj de la jenaj (kaj similaj) paroj de substantivoj: saĝo – saĝeco; granda – grandeco; belo – beleco; longo – longeco; bono – boneco; viglo – vigleco? Krome, kial oni ne rajtas same paraleligi aliajn substantivojn, kiel ekzemple: koro – koreco; libro – libreco; litero – litereco; literaturo – literatureco?

Respondo

Jen tre interesa demando, kaj indas, por pli klare respondi ĝin, komenci per iom da historio. Ĝis la jaro 1911 ne ekzistis ĝenerala teorio pri vortfarado en Esperanto. Ekzistis nur la Regulo 11 de la Fundamenta Gramatiko, kiu tekstas jene (laŭ Fundamenta Krestomatio): Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (radikoj) (la ĉefa vorto staras en la fino); la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj. Simile, en § 27 de Fundamenta Ekzercaro troviĝas la jena regulo: Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinaro la purajn radikojn, sed, se la bonsonco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo.

Tiujn ĉi tre ĝeneralajn regulojn komplementis ekzemploj el la Ekzercaro kaj el verkoj de

Zamenhof kaj aliaj bonaj aŭtoroj.

En 1907 Louis Couturat publikigis la broŝuron *Étude sur la dérivation en Esperanto* (Studo pri la vortoderivado en Esperanto), per kiu li kritikis la vortfaradon de Esperanto kiel nelogikan. Por rebati liajn argumentojn, René de Saussure publikigis en 1911 la broŝuron *La logika bazo de Vortfarado en Esperanto*. Sekvis ĝin du pliaj broŝuroj: *La construction logique des mots en Esperanto* (La logika vortokonstruado en Esperanto, 1910) kaj *La Vortteorio en Esperanto* (1914). Fine li publikigis, kiel raporton al la Akademio de Esperanto, la verkon *Fundamentaj reguloj de la Vort-teorio en Esperanto* (1915), kiu resumas la teorion per dek ses reguloj kaj multaj ekzemploj. La ĉi-lastata verko formas la bazon por la nuntempa kompreno pri vortformado. Poste Kolomano Kalocsay ellaboris la teorion de Saussure.

En 1967 la Akademio de Esperanto aprobis sian *Finan Rekomendon* pri la Vortfarado en Esperanto. Ĝian enhavon ni nur resume traktos ĉi tie, por teni nian klarigon simpla kaj alcela. La Rekomendo agnoskas, ke ĉiu nuda radiko posedas propran gramatikan karakteron. Fakte, en la Fundamenta Vortaro la radikoj aperas nudaj, t.e., sen aldonita finaĵo, sed ĉiuj nacilingvaj tradukoj de ĉiu unuopa radiko esprimas la saman gramatikan kategorion. Ekzistas do

tri ĉefaj kategorioj: O-radikoj (substantivaj), A-radikoj (adjektivaj) kaj I-radikoj (verbaj); nur la du unuaj koncernas la supran demandon.

La finaĵo -o ne ŝanĝas la bazan signifon de radiko. Kun A-radiko tiu finaĵo havas la signifon de pli aŭ malpli abstrakta ideo pri kvalito; ekzemple: la belo, la ruĝo, la eblo. Kontraste, la sufikso -aj- montras nur konkretan manifestiĝon de tiu kvalito, dum -ec- montras nur la kvaliton; ekzemple: bel-aj-o, bel-ec-o. En la unua parto de la supra demando, saĝ-, grand-, bel-, long-, bon- kaj vigl- estas ĉiuj A-radikoj, kiel konfirmos konsulto al la Universala Vortaro. Do ekzemple saĝ-o montras ideon aŭ koncepton, dum saĝ-ec-o montras specife nur la kvaliton; la samo aplikiĝas al la ceteraj radikoj de tiu listo. Ofte la diferenco inter tiaj du formoj estas nuanca.

Cetere, por esprimi mezurojn, preferindas uzi la koncernan A-radikon simple kun -o finaĵo: kvin metroj da alto; la longo de la ŝoseo estas dudek kilometroj; la mezvaloro mu de normala variablo havas maksimuman probablon.

Jen kelkaj Zamenhof-aj ekzemploj pri la finaĵo -o kun A-radiko:

Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn da longo. (FE § 32)

Sed li trankvile marŝas en la altoj, Neatingebla dio en ventego. (IT)

Tro da libero kondukas al mizero. (PE)

Feliĉo kaj riĉo envion elvokas. (PE)

Mario foriĝis en la profundon de la salono, [...] (M)

Ĝi estis komence sopiro, poste plendo, fine malpacienca ribelo de spirito, kiun premas ia fatala neceso, [...] (M)

[...] cent jaroj pasis depost la naskiĝo de la poeto de noblaj virinaj koroj, de la prikantanto de la granda kaj belo, [...] (FA4)

La leono disŝiradis sufiĉon por siaj idoj, [...] (MT)

Li etendis la nordon super la malpleno, [...] (MT)

Provu aldoni la sufikson -ec- en ĉiu unuopa ekzemplo, kaj konstati, kiel (mal)draste ŝanĝiĝas la signifo.

Kiel diferencas la dua vortlisto de la demando disde la unua? Ĉiuj radikoj en tiu listo estas O-radikoj. Aldoni la sufikson -ec- ĉiam faras, ke la vorto esprimu kvaliton. Ekzemple, libr-o esprimas la koncernan objekton, dum libr-ec-o esprimas la kvaliton de libro. Tiaj derivaĵoj ja estas eblaj kaj ĝustaj, eĉ se maloftaj en la praktiko.

Mallongigoj: FA4 = Fabeloj de Andersen (4-a volumo); FE = Fundamenta Ekzercaro; IT = Ifigenio en Taŭrido; M = Marta; MT = Malnova Testamento; PE = Proverbaro Esperanta.” ■

Ekzemplo Imitinda kaj Imitenda!

BENEDICTO SILVA

Jam de kelkaj monatoj mi kaj Paulo Sergio Viana ne interŝanĝis vortojn, impresojn!... Eĉ ne banalaĵojn.

Antaŭ tamen ĉ. unu semajno, jen mi legis en *La Lampiro* lian belan tekston *Floro – kontraŭ – doloro*, kaj mi ne rezistis la tenton esprimi al li la plezuron, kiun lia teksto faris al mi... Responde, interalie li invitis min verki unu-du-paĝan tekston por la proksima numero de *La Lampiro*, kaj li demandis: Ĉu vi emas?

Sendube, mi emas! Preskaŭ ĉiuj olduloj estas grumblemaj...

Kaj tuj venis al mi en la kapon la deziro diskonigi fakton lastatempe okazintan en la esperantista mondo...

Antaŭ ĉ. unu jaro mi ekdecidis partopreni en la 104-a Universala Kongreso en Finnlando. Tion mi faros — mi tuj pensis — ĉefe pro tio, ke mi imagas tiun nordan landon kiel naturan, magian scenejon de la herooj de *Kalevala*, se ne paroli pri la stranga vivado de la *Sep Fratoj* de Aleksis Kivi...

Farinte mian aliĝon al la UK en Lahtio, mi ne povis eviti miajn belajn, dolĉajn revojn...: Veturi tra Finnlando, rememorante ne nur la scenojn, sed ankaŭ la neforgeseblajn aventurojn de la herooj de *Kalevala* (la aĝa, saĝa Väinämöinen, la prapoeto; Sampa, fean filon de grenkampo; Ilmatar, aerfeinon; la plej altan dion Ukko; la aerajn kampojn vastajn, ktp, ktp...).

Kia ne estis mia surprizo, kiam mi, enmaniginte la tradician sakon de la UKoj, mi ekvidis en ĝi la verdan

volumon de la 2-a eldono de *Kalevala*!

Komence, mi tute ne kredis! Mi kvazaŭ deliris!

Mi ne scias, ĉu tio jam okazis en antaŭaj Universalaj Kongresoj de Esperanto...

Se ne, mi elkore kaj sincere gratulas la Organizan Komitaton de la 104-a, kiel inteligentan kaj malavaran iniciatinton!

Surbaze de tiu ekzemplo de Finnlando, mi sugestas al la ceteraj landoj, inkluzive de mia lando, Brazilo, de nun donaci al ĉiu UK-ano ekzempleron de grava verko de sia literaturo. Ekzemple: Brazilo, unu el la verkoj de Machado de Assis, en la altnivelaj tradukoj de Paulo Sergio Viana, aŭ de aliaj aŭtoroj, ankaŭ jam esperantigitaj; Japanio, la klasikaĵon *Neĝa Lando* de Kawabata, aŭ alian; Francio, ekzemple, *La Eta Princo* de Exupéry, aŭ aliajn verkojn de la tre riĉa Franca Literaturo; Svedio, unu el la verkoj de Selma Lagerlöf, kiel, ekzemple, *Gösta Berling*, en la traduko de Stellan Engholm, aŭ *La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson*, tradukitan de Sten Johansson; Nederlando, unu el la klasikaĵoj de la nederlanda beletro, en traduko de la eminenta profesoro Gerrit Berveling... ktp, ktp...

Ĉar oni povas aserti, ke la tutmonda Esperanta literaturo jam estas tre riĉa, certe pluraj landoj, en oriento kaj en okcidento, povas facile plenumi mian sugeston kaj ankaŭ sekvi la laŭdindan ekzemplon de Finnlando!

Denove Ĉesos La Ondo de Esperanto

PAULO SÉRGIO VIANA

La Ondo de Esperanto estas unu el la plej tradiciaj, prestiĝaj revuoj en nia lingvo. Ĝi havas kuriozan historion. Ĝi ekaperis en la jaro 1909, en Moskvo, kaj regule publikiĝis ĝis 1917. En 1991, la eldonejo Sezonoj, nun situanta en Kaliningrado, rekomencis la publikigon, sub la redaktado de Aleksander Konĵenkov kaj administrado de Halina Gorecka. Ekde 2017, ĝi ne plu aperis papere, sed nur elektronike. Tiel ĝi fariĝis unu el la plej fidindaj, ampleksaj kaj modelaj primovadaj revuoj. Inter la iniciatoj okazantaj ĉirkaŭ ĝi, estas la grava literatura konkurso “Liro” kaj la Internacia Fotokonkurso. Ankaŭ podkasto de “Radio Esperanto” estas produktataj.

Antaŭ kelkaj semajnoj, malĝojiga sciigo atingis la Esperantistaron en la tuta mondo: “La Ondo” denove ĉesos aperi! Ĉi-sube ni reproduktas la koncernen noton de la redaktoro, aperintan en la oktobra numero.

Grava perdo por nia movado!

La lasta jubileo de La Ondo

La oktobra kajero de La Ondo de Esperanto estas jubilea – la tricenta ekde la (re) lanĉo de ĉi tiu gazeto en majo 1991. Sed la jubileo havas iom amaran kromguston, ĉar ĝi estos la lasta jubileo de La Ondo, kiu aperos nur ĝis la fino de la nuna jaro.

Ni estas devigitaj fari ĉi tiun decidon ĉefe pro la malprogresanta vidkapablo de la redaktoro, kiu

apenaŭ kapablas plu laboregi antaŭ la komputila ekrano ĉiutage po 18 horoj (ekde la 9a matene ĝis la 3a nokte) dum la redaktado de La Ondo; li devas laŭeble rapide reduktisian labortagon por konservi la reston de sia vido.

Pro ĉi tiu decido, publike anoncita la 21an de septembro en Poznano kadre de la 35a ARKONES, ni devis rekonsideri la eldonplanon de la gazeto por enmeti en la lastan numeron la tekstojn, kiuj kutime aperas en la januara kaj februara numeroj: ronda tablo pri la atingoj kaj fiaskoj dum la pasinta jaro, anonco pri la elekto de la Esperantisto de la Jaro, kaj la statistiko pri la eldonado en 2019.

La novembra Ondo (No301) aperos la 25an de novembro.

La decembra Ondo (No302) aperos la 30an de decembro.

Kompreneble, la baldaŭa ĉeso de La Ondo ne signifas, ke ni forlasos Esperanton. Ni plu okupiĝos pri la libroeldonado, reta informado, podkastado, verkado, tradukado, recenzado, esplorado, prelegado, bibliografiado k. a.

Al ĉiuj aŭtoroj, abonantoj kaj perantoj ni direktas nian koran dankon pro ilia helpo!

Halina Gorecka,
eldonanto
Aleksander
Konĵenkov,
redaktoro



Forpasis la nepo

PAULO SÉRGIO VIANA



Je la 9-a de oktobro 2019 forpasis en Parizo Ludoviko-Kristoforo Zaleski-Zamenhof, en sia 94-a aĝojaro. La Esperantistaro

funebrias kaj kondolencas.

Lia avo, la “Majstro” estis unu el elstaraj figuroj en la historio de la homaro, sed ni ne funebrias nur pro tio, ke temas pri la nepo. Ludoviko-Kristoforo lasis al ni sian propran personecon. Li estis milda, simpatia, klera, kompetenta kaj homama Esperantisto, kiu delikate kaj elegante tenis vivanta la memoron de sia avo, sed samtempe kontribuis al nia komunumo per propra lumo.

Li estis filo de Adam kaj Wanda Zamenhof, kaj ne estis denaska Esperantoparolanto. Li lernis la lingvon kiam li estis 9-jara, pro deziro partopreni en Universala Kongreso de Esperanto. Li

partoprenis plurajn kongresojn, vizitis multajn landojn, ĉiam portante la idealon de la avo. Kaj unu el liaj ĉefaj kontribuoj estas la libro “La Zamenhof-Strato”, kiu konsistas el intervjuo, kiun li donis al la pola ĵurnalisto Roman Dobrzynski. Ĝi estas tradukita al pluraj lingvoj.

Ludoviko-Kristoforo estis inĝeniero kaj instruisto pri

konstruado.

Li travivis la terurajn kondiĉojn de la varsovia geto, okaze de la germana okupacio. El tie li eskapis per falsaj dokumentoj, kune kun sia patrino. De tiam li alprenis siajn kromajn nomojn “Zaleski” kaj “Kristoforo”, kiujn li konservis por ĉiam. Jen liaj propraj vortoj pri tiu momento de lia vivo:

“Post la milito mi retroiris al mia naskiĝnomo, sed mi ne scipovis disiĝi de mia milita pseŭdonimo. Se Zaleski savis Zamenhofon, ne decidis, ke Zamenhof deturniĝu de Zaleski. Mi identiĝis kun unu kaj la alia kiel Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof. Diferencoj en unueco estas fundamento de la ideo de toleremo, kiun mi akceptis kiel la devizon de mia vivo. La samon celis mia avo, Ludoviko Zamenhof, kiu vidis sian verkon ne kiel kodon por komercistoj, sed kiel helplingvon, servantan kompreniĝon inter homoj kaj popoloj.” ■



Kiomgranda Estas Via Bonkoreco? (Alivorte, Kiomlibera Vi Estas?)

JOSÉ MAURO PROGIANTE

Eble la titolo de ĉi tiu teksto ŝajnas stranga, ĉar ne estas memevidenta la rilato inter bonkoreco kaj libereco. Ioma rezonado necesas por kompreni la proponatan demandon.

Bonkorulo estas tiu, kiu donas parton de siaj havaĵoj, materiaj kaj nemateriaj, al homoj, kiuj ne apartenas al lia intima rondo.

La ago doni al intimuloj (familianoj, amikoj) fontas el amo, ne el bonkoreco, sed plej ofte ne el amo grandanima. Sufiĉas konsideri, ke eĉ kruelaj banditoj amas kaj protektas la siajn. Tiu amo estas forte egoisma kaj potencie suferiga, ĝi ne asociiĝas al libereco. Kiam oni parolas pri amo, oni ne parolas pri libereco, ĉar oni ne decidas ami, oni simple amas, volante aŭ ne.

La amo ne akceptas komandon, tial neniu povas elekti la objektojn de sia amo. La bonkoreco, kontraŭe, estas regebla, ĝia estiĝo esence dependas de memvola impulso. La bonkorulo senigas sin je io propravole, konscia pri sia libereco tion fari. Li agas pro deziro bone uzi sian libervolon, ne pro nerezistebla amligiteco.

Bonkoreco kaj egoismo estas antipodaj. La egoisto donas nur al siaj amatoj kaj nerekte al si mem, ĉiam kaptita de siaj propraj interesoj, de sia malhumaneco. La bonkorulo estas libera de bagatelaj posedaĵoj, koleriĝoj kaj ĵaluzoj, li estas libera de

si mem. Esti bonkora signifas esti kapabla doni ne amante. Iu ajn povas doni pro amo, eĉ la egoisto.

Rara virto estas la bonkoreco, kaj pro tio multe admirata. En ĉiu el ni ĝi estas tre malfortika kaj la egoismo preskaŭ ĉiam pli fortas. Ni tiom intense amas niajn filojn kaj tiom feble la filojn de la aliuloj... Kompreneble, ĉar ili estas niaj, kaj ni amas nin mem pere de ili. Jen amo ankoraŭ kun trajtoj de plilarĝiginta egoismo, do ne liberiga.

Certe ankaŭ la amo povas esti liberiga. Tio okazas, kiam ĝi atingas en la animo superan gradon, kiam la cirklo de la primitiva egoismo tiom plilarĝiĝas, ke fakte la egoo perdas sian gravecon. Tamen, survoje al tiu punkto de sia evoluado, la homo trovas liberecon en la bonkoreco, turnante sin al la estuloj situantaj trans la horizonto de lia intimularo.

Bonkoreco estas deziro plivastigi sian amrondon, deziro de komuna ĝojo kaj kundivido. Esti bonkora estas klopodi naski en si amon al iuj ankoraŭ ne amataj. Tiel ke, se amo estas celo, bonkoreco estas vojo, sur kiu la homo decidas kaj la horon ekpaŝi kaj sian rapidecon.

Ju pli ni disdonas volonte, des pli liberaj ni fariĝas. La bonkoreco liberigas nin de nia eta mio, de malgrandanimeco, de avareco, de profitemo kaj aliaj malnoblaĵoj. ■

Iom da poezio!

Maria Nazaré Laroca
Trobo kaj Esperanto estas fratoj!

Bedaŭrinde mi ne povis partopreni en la 13-a Esperanto-Kongreso de Ŝtato San-Paŭlo, en la urbo San-Karlo, kie la fama samideano kaj trobisto Walter Francini loĝis kaj multe propagandis nian lingvon. Kun grandega ĝojo mi eksciis ke li verkis interesan libron, kies dulingva titolo estas *Sur flugiloj de trobo kaj de Esperanto* (Nas asas da trova e do Esperanto), São Paulo, 1984.

Pasintan monaton mi partoprenis en bonega Ateliero pri troboj (evento de la Beletra Akademio de Juiz de Fora - AJL) gvidita de akademiano kaj fama trobisto Arlindo Tadeu Hagen. Li informis al ni pri sia partopreno en Internaciaj konkursoj de troboj en EASP. La Unua dulingva internacia konkurso pri troboj okazis en la jaro 1980, organizita de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo.

Laŭ Francini, “la temoj prezentitaj estis “Amikeco”, por la troboj en la portugala, kaj “Frateco”, por la troboj en Esperanto. (...) Atingis la juĝkomisionojn pli ol 800 troboj en la portugala (venintaj de Brazilo kaj Portugalujo) kaj 50 en Esperanto, el kvin landoj: Ĉilio, Kanando, Pollando, Portugalujo kaj Brazilo.

Interesa kaj laŭdinda fakto estis, ke la fama premiita brazila trobisto Clovis Maia lernis Esperanton speciale por partopreni la konkurson. Jen unu el liaj venkintaj troboj:

Frateco – ora ĉenero.
Homaron ĝi enĉenigas.
Pli forta estas ol fero
kiam la am’ ĝin fortigas.
(Clóvis Maia)

“Trobo kaj Esperanto estas fratoj!” – asertas la famega trobisto Izo Goldman, sur la bela enkonduka paĝo de la libro de Walter Francini. Laŭ Izo Goldman, ambaŭ trobo kaj Esperanto “estas filoj de Inspiriteco kaj de Idealo, kaj protektatoj de Amo”.

Por la venk’ de Esperanto,
Iru nial la labor’.
Sur la lipoj – varma kanto,
firma kredo – en la kor’.
(Walter Francini)

Ĉu EASP ŝatus revivigi la dulingvajn internaciajn konkursojn pri troboj? Venu al ni la ora tempo “sur flugiloj de troboj kaj de Esperanto”!

ANNA LOBO

PRI KINO KAJ ALIAJ ARTOJ

BAKURAŬO

Originala nomo: Bacurau

Lanĉo dato: 29.08.2019

Tipo de filmo: Dramo, Suspenso

Direktoroj: Kleber Mendonça Filho, Juliano Dornelles

Aktoroj: Sônia Braga, Udo Kerr kaj Barbara Cohen

Nacioj: Brazilo kaj Francio

Tempodaŭro: 132 min



Pedro Sotero

Je la komenco de oktobro, mi vojaĝis al la sudo de Brazilo. Tie mi renkontis miajn esperantajn amikojn de la regiono! Koran dankon al ĉiuj, kiuj tiom dolĉe ricevis min!! Kial mi rankontas tion ĉi tie? Ĉar la filmon, pri kiu mi parolos nun mi spektis en kinejo, en tiu vojaĝo. Mi tiom ĝuis la spektadon, ke mi decidis recenzi ĝin por la revuo. Mi esperas, ke mi instigas vin ankaŭ ĝin spekti!

Tiu ĉi nova brazila filmo okazas en nordoriento de Brazilo. Dum la komenco de la filmo oni imagas, ke temas pri nuntempo, sed iom post iom oni komprenas, ke temas pri iu “dystopia” estonteco. Estas tre klaraj multaj aspektoj de nordoriento de Brazilo. Je iu momento, ekaperas multaj strangaj situacioj - akva kamiono pafita, du strangaj motorciklistoj ĉe la urbo, oni ne plu trovas la urbon ĉe la mapo... Kio aŭ kiu tiom ĉasemas kaj soifas pri

sango?

Mi ege ĝuis kiel ĝi estis gvidita kaj filmita. La aktoroj estis ege bonaj kaj altnivelaj. Kompreneble, fotografio estis tre interesa ankaŭ, montrante ĝian kutiman pejzaĝon. Estas interesa rimarki, ke ne estas iu elstara homfiguro aŭ rolo tie - Oni povus facile diri, ke la ĉefa rolo estas la urbo Bakuraŭ kaj ĝia popolo, kune.

Per ĝi ankaŭ oni povas fari multajn diskutojn pri diversaj temoj, kiel politiko, perfortemo, homaj ligoj, kaj aliaj. Ĝi estas ege impresa, ampleksa kaj skua filmo. Tiom ke unu el la aktoroj de la filmo, konfesis ke estis la unua filmo kiun li partoprenis kaj kiu lin plorigis.

Kio okazas al la urbo kaj ĝia popolo? Kio aŭ kiu ĝin minacas? Ĉu vi kuraĝas akompani la historion? Ĉu vi estas sufiĉe forta por kunigi al homoj de la urbo Bakuraŭ? Mi esperas ke vi ĝuos la spektadon, kaj ĝis la sekva filmo! ■





LA LAMPIRO